

Bob Black

La **abolo** de la laboro



Eldona Fako Kooperativa de SAT

Bob Black

Abolition of work, 1985

Esperantigis : Djémil Kessous

Foto en la Kovrilpaĝo :

Gabriel Laurent “tro da feliĉo”.

Laboristoj Ripozas

www.phototheque.org

la libro en la angla

<http://inspiracy.com/black/abolition/part1.html>

kaj en la franca

<http://www.aredje.net/lecture.txt/black1.htm>

La tekstoj estas liberaj.

SAT Eldona Fako Kooperativa, 2007

ENKONDUKO DE LA TRADUKINTO

Unu el la plej gravaj institucioj en nia moderna socio estas la laboro. La *Abolo de la laboro* de Bob Black estas la plej grava kritiko al la laboro, iam ajn skribita, kaj sekve la plej revolucia teksto ekzistanta. Sed ĝi ne estas nure revolucia laŭ la signifo “detruiva”. Kiel vi povos legi fine de tiu verko, ĝi ankaŭ kuntenas konstruivajn proponojn. Tiu tradukado origine aperis en Liberecana Ligilo (n° 111 de 2004). Tiu nova versio estas relegita, korektita kaj subnotita (ĉefe por la bibliografiaj referencoj).

NENIAM IU AJN DEVUS LABORI

Neniam iu ajn devus labori.

La laboro estas la fonto de preskaŭ la tuta mizero en la mondo. Ĉiuj plagoj, kiujn vi povus nomi, venas de tio, ke oni laboras aŭ vivas en mondo dediĉita al la laboro. Cele al la halto de la sufero, ni devas haltigi la laboron.

Tio ne signifas, ke ni devas ĉesigi ĉian agadon. Tio signifas la kreadon de nova vivmaniero bazita sur la ludo; alidirite iu *luda revolucio*. Per “ludo”, mi ankaŭ komprenas feston, kreadon, kunmanĝadon, kunvivadon, kaj eble arton. Ludo estas pli grava ol infan-ludo, tiom riĉiga, kiom tiu lasta povas esti. Mi alvokas kolektivan aventuron en ĝenerala ĝojo kaj libera reciproka vigleco. Ludo ne estas pasiveco. Sendube ni ĉiuj bezonas iom pli da tempo por la pura pigreco kaj por la senstreĉiĝo ol tiu, kiun ni povas ĝui nun, kiu ajn estas nia laboro aŭ enspezo, sed post kiam ni estas ripozitaj de dunga lacego preskaŭ ĉiuj el ni volas agadi. Oblomovismo (*nenion farado*) kaj Stakanovismo (*histeria laboro*)¹ estas ambaŭ flankoj de la sama senvalora mono.

La luda vivo estas tute neakordigebla kun la nuna

realeco. For tiu “realeco”, nigra truo ensorbanta la vivpovon ĝis tiu plej eta parto de l’vivo, kiu apenaŭ diferenciĝas de l’nura vivtenado! Strange -aŭ eble ne-ĉiuj malnovaj ideologioj estas konservemaj ĉar ili kredas je la laboro. Kelkaj el ili, kiel marksismo kaj la plimulto da anarkiismaj tendencoj, kredas je la laboro tiel furioze, kiel ili kredas je preskaŭ neniu alia afero.

La liberaluloj asertas ke ni devus ĉesigi la *dungadan discriminacion*. Mi asertas ke ni devas ĉesigi la *dungadon*. La konservemuloj subtenas la leĝojn de *rajto je laboro*. Sekve de Paul Lafargue, la petola bofilo de Marx, mi subtenas la *rajton je pigreco*². La maldekstruloj aprobas la *plenan dungadon*. Kiel la surrealistoj, krom ke mi ne ĉersas, mi aprobas la *plenan sendungadon*. La trotskistoj aktivis favore al la *konstanta revolucio*. Mi aktivis favore al la *konstanta festo*.

Nu, se ĉiuj ideologistoj subtenas la laboron -ne nur ĉar ili planas ke la aliuloj plenumu ilian laboron-ili estas strange hezitemaj por ĝin eksplicite diri. Senfine ili parolados pri la salajro, la horaroj, laborkondiĉoj, ekspluatado, produktiveco, efikeco... Ili plezure pritraktos ĉion ekskluzive de la laboro mem. Tiuj spertistoj, kiuj sin ofertas por pensi anstataŭ ni, malofte liveras iliajn konkludojn pri la laboro, rilate ties elstarecon en ĉies vivoj. Ili ĉikanas inter si pri detaloj. La sindikatoj kaj mastraro interkonsentas, ke ni devus vendi la tempon de niaj vivoj kontraŭ la nura vivtenado, kvankam ties

prezon ili marĉandas.

La marksistoj pensas ke la burokratoj nin mastrumu. La libertarianoj³ pensas ke la negocistoj nin mastrumu. Feminist(in)oj ne zorgas kiu mastrumu dum la mastroj estas inoj. Klare tiuj ideologovendistoj havas seriozajn diferencojn pri la partigo de la potenco, la poten CRABAĴO. Estas ankaŭ tiom klare ke neniu el ili havas ian ajn objekton kontraŭ la potenco mem kaj ĉiuj el ili volas ke ni daŭrigu la laboron.

Eble vi demandas vin ĉu mi estas ŝerca aŭ serioza. Mi estas ŝerca *kaj* serioza. Ludi ne estas ludaĉi. Ludoj ne estu bagateloj, kvankam bagatelo ne estas trivialeco: la plej ofte ni devus trakti bagatelon serioze. Mi ŝatus, ke la vivo estu ludo, sed ludo kun grava vetaĵo. Mi volas daŭre ludadi.

¹ Oblomov, heroo de la samnoma romano de Gonĉarov, estas bienulo, kiu la tuta tago, dormas, sonĝas, revas, nenion faras. La romano aperis en Rusio meze de 19a jarcento (1859) kaj montras la krizon de tiu epoko en cara Rusio.

² Temas evidente pri la verko de Paul Lafargue, *Le droit à la paresse* ("La rajto je pigreco"). Esperanta traduko estas disponebla ĉe: SAT broŝurservo, Cargue Sac, 47470 Beauville.

³ "Libertarianoj" (ne PIVa vorto usondevena [*libertarian*]) estas ekstremaj liberalistoj, kiuj situas en la ekstremdekstro de la politika pejzaĝo. Ili celas aboli la ŝtaton kaj ĉion privatigi.

MIZERO DE LA SALAJRECO, RIĈECO DE LA LUDO

La alternativo al la laboro ne estas nura senokupeco. Esti ludema ne signifas esti dormema. Mi fakte ege ŝatas la plezuron de l' duondormo, sed trovas ĝin reale gratifika kiam ĝi interpunkcias aliajn plezurojn kaj ŝatokupojn. Nek pli promocias mi la sekuran valvon de l' mastrumita horardisciplino nomita "distraĵoj"; foren tio! Distraĵoj konsistas el mallaboro komisie de la laboro. Distraĵoj estas la tempo dediĉita por refortiĝi post la laboro kaj por provi forgesi ĝin, freneze sed senespere. Multe da homoj revenas de siaj ferioj tiel tristaj, ke ili ŝajnas reiri al la laboro ĉar ili ne povas plu ripozi. La ĉefa diferenco inter laboro kaj distraĵoj estas ke en la laboro vi havas pagon por via alieneco kaj nervoziĝo.

Mi ne vortludas kun iu ajn. Kiam mi diras, ke mi volas aboli la laboron, mi ekzakte opinias kion mi diras, sed mi volas raporti kion mi pensas klarigante miajn terminojn per nefakaj rimedoj. Mia minimuma difino de la laboro estas *trudtasko*, nome *devigata produktado*. Ambaŭ vortoj estas esencaj. Laboro estas la produktado devigita per ekonomiaj aŭ politikaj rimedoj, per la karoto aŭ la bastono (la karoto estas nur la pluigi de l' bastono per aliaj

rimedoj). Sed la tuta kreado ne estas laboro. La laboro neniam estas farita por si mem, ĝi estas farita pro la atendo kelkan produkton aŭ rezulton, kiun la laboristo (aŭ pli ofte kelkaliulo) ricevas de ĝi. Jen kial la laboro estas necesa. Ĝin difini estas ĝin malestimi. Sed la laboro estas ĝenerale eĉ pli malbona ol tio, kion ties difino starigas. La dinamiko de interna superregado por la laboro inklinas laŭtempe fariĝi totala. En la socioj de invadinta laboro, inkluzive de ĉiuj industriiĝintaj landoj, ĉu kapitalismaj ĉu “komunismaj”⁴, la laboro nepre akiras aliajn kvalitojn, kiuj plifortigas ĝian abomenindecon.

Kutime la laboro estas *dungado*, nome *salajra laboro*, kio signifas sin vendi kredite – kaj tio estas eĉ pli vera en la “komunismaj” landoj, kie la ŝtato estas preskaŭ la nura dunganto kaj ĉiu homo dungito, ol en la kapitalismaj landoj. Tiel 95% da laborantaj usonanoj, laboras por iu (aŭ io) alia. En Sovetunio aŭ Kubo aŭ Jugoslavio aŭ iu ajn alia simila ŝtato, kiun oni povus citi, la rilata fenomeno alproksimiĝas 100%. Nur en la kamparaj landoj de l’tria mondo-Meksiko, Hindio, Brazilo, Turkio-, portempe troviĝas notindaj aroj da kamparanoj, kiuj pluigas la tradician aranĝon de multaj laboristoj dum la lastaj jarmiloj: la pagado impostojn (trudmonon eĉ tributon) al la ŝtato aŭ renton al parazitaj bienuloj kontraŭ ia trankvileco. Eĉ tiu kruda interkonsento komenciĝas ŝajni bona, preferinda al la salajrata sklaveco. Ĉiuj industriaj kaj ofcaj laboristoj estas dungitoj, kiuj suferas tiun specon de kontrolo, kiu daŭrigas ilian servuton.

Sed la moderna laboro havas pli malbonajn sekvojn. La homoj ne nur laboras, ili havas “ĝobojn”⁵ kaj konstante plenumas unu ekskluzivan produktan taskon. Eĉ se tiu tasko havas ian kvanton da intereso (kreskanta nombro da ĝoboj ne tion havas), la unutoneco de ĝia deviga ekskluziveco elĉerpas ĝian ludan kapablecon. Tasko, kiu povus logi la energion de kelkaj personoj dum prudenta limigita tempo, por sia plezuro, estas nur ŝarĝo sur tiu, kiu devas ĝin plenumi kvardek horojn semajne sen ebleco diri ion pri la maniero, laŭ kiu ĝi devas esti farita por la profito de proprietuloj (kiuj kontribuas per nenio al la entrepreno), kaj sen perspektivo dispartigi la taksojn aŭ maldensigi la laboron inter tiuj, kiuj devas ĝin reale fari. Jen la vera mondo de la laboro, mondo de burokratikaj bagateloj, de seksaj persekutoj kaj diskriminacioj, de stultaj estroj ekspluatantaj kaj persekutantaj siajn subulojn, kiuj, laŭ ia ajn racia aŭ teknika kriterio, devus ĉion mem gvidi. Sed la kapitalismo envere subigas la racian maksimumigon de l’profito kaj produktiveco al la postulo de la organiza kontrolo⁶.

La mizero, kiun multaj laboristoj spertas en la laboro estas la sumo de diversaj indignaĵoj, kiun oni povus nomi “disciplino”. De tio, Foucault⁷ verkis kompleksajn analizojn sed ĝi estas sufiĉe simpla. La disciplino konsistas el la aro de l’totalismaj kontroloj en la laborloko -voktado, rutina laboro, devigitaj laborritmoj, produktokvotoj, pordokontrolo *eniranta* kaj *eliranta*. La disciplino estas tiu afero, kiu estas komuna ne nur al la fabriko, la oficejo kaj

la vendejo, sed ankaŭ al la prizono, la lernejo kaj la frenezulejo. Ĝi estas iu fakto historie originala kaj terura, kiu superintus la kapablecon de tiaj iamaj demonaj diktatoroj, kiaj Nerono, Ĝingis-Ĥano kaj Ivano la Terura. Tiaj malicaj, kiaj tiuj ĉi estis, ili ne povis disponi pri la maŝinaro por kontroli siajn regatojn tiel totale, kiel faras la modernaj despotoj. La disciplino estas la diabla moderna kontrolmetodo, ĝi estas noviganta entrudiĝo, kiun oni devos malpermesi kiel eble plej rapide.

Kiel estas la laboro, tiel ekazkte mala aperas la ludo. La ludo ĉiam estas memvola. Kia povus esti ludo, tia estas laboro se ĝi estas trudata; jen baza aksiomo. Bernie de Koven difinis ludon “interrompo de la konsekvencoj”. Tio estas neakceptebla se ĝi implicas, ke ludo estas malkonsekvenca, frivoleca. La problemo ne estas ke ludo estas sen konsekvenco; tio celas senvalorigi la ludon. La problemo estas ke, se estas iuj konsekvencoj, ili estas senpagaj. Ludi kaj doni estas streĉe ligitaj, ili estas respektive la kondutecaj kaj interŝanĝecaj flankoj de la sama impeto, la ludinstinkto; ambaŭ havas aristokratan malestimon por la rezulto. La ludanto eltiras ion ludante; tial li ludas. Sed la esenca rekompenco estas la sperto de la agado mem (kia ajn ĝi estas). Kelkaj aliaj atentemaj studintoj de la ludo, kiel Johano Huizinga (*Homo Ludens*)⁸, ĝin difinis nur ludpraktiko, *ludludado*, aŭ aro de sinsekvaj reguloj. Mi respektas la erudicion de Huizinga sed absolute forĵetas ties striktajn difinojn. Estas multe da bonaj ludoj (ŝakoj, pilkludoj, Monopoly, briĝo) kiuj estas

regataj de reguloj, sed la ludo estas notinde pli ampleksa ol la nura ludpraktiko. Interparolado, sekso, danco, vojaĝo, tiuj agadoj ne estas regataj de reguloj sed ili certe estas ludoj, se io ajn estas tia. Kaj eĉ regulojn oni povas priludi tiel facile kiel io ajn.

⁴ Oni ne forgesu ke tiu eseoj estis skribita dum la 1980aj jaroj, tiam ke la t.n. “komunismaj” landoj estis pli multnombraj.

⁵ *Ĝobo* (ne PIVa, nek akademia vorto), estas ordinara anglalingva nomo de la laboro (*job*). Mi taksas tiun vorton eniginda en Esperanton. Tiu lasta, male al diversaj naciaj lingvoj, estas ege malriĉa koncerne la nomojn de la laboro.

⁶ Ĉu la “racia maksimumigo de l’profito” estas reale subigita al “la postulo de la organiza kontrolo”? Ĉu ambaŭ faktoroj ne estas senteble kontraŭecaj? Jen gravaj demandoj.

⁷ Foucault (1926-1984), franca filozofo engaĝita en la maldekstraj luktoj (fine de sia vivo li estis proksima al maŭistoj). Li celis esprimigi la voĉojn de sube, sufokitajn de la potenco. Lia verkaro, grandparte historia, notinde pritraktas la novan disciplinon, kiuj intervenas kun la modernepoko: la leĝon, *subpremigan*, kiu montras tion, kio estas permesita (kaj sekve ankaŭ tion, kio estas malpermesita), la normon, *instigan*, kiu efikas en la laborejo, en la lernejo, en medicino... (*Historio de la frenezeco dum la klasika tempaĝo*, 1961, *Vokti kaj puni*, 1975).

⁸ Johan Huizinga (1872-1945), nederlanda filozofo. Li notinde verkis *Homo ludens*, libro en kiu li celas elmontri ke la esenco de la homo estas la ludo. Antaŭ ol esti *faber* (fabrikanto) aŭ *sapiens* (scianto) la homo estus *ludens* (ludanto).

MODERNA SKLAVECO KAJ ANTIKVA LIBERECO

La laboro ofendmokus la liberecon. La oficiala vidpunkto estas ke ni havas rajtojn kaj vivas en demokratio. Aliaj malŝanculoj, kiuj ne estas liberaj kiel ni, devas vivi en policaj ŝtatoj. Tiuj viktimoj obeas la ordojn, kia ajn estas ties tiraneco. La potenco ilin gardas sub konstanta kontrolo. La ŝtataj burokratoj kontrolas eĉ la plej malgrandajn detalojn de la ĉiutagaga vivo. La oficistoj kiuj ilin persekutas responsas nur antaŭ siaj superuloj, publikaj aŭ privataj. Ambaŭflanke la disidentecon kaj malobeon oni punas. Denuncistoj regule raportas al la aŭtoritatuloj. Ĉion ĉi oni prezentas al ni malbonega afero.

... Kaj tia ĝi estas, kvankam nenio alia ol priskribo de l'moderna entrepreno. Liberaluloj, konservativuloj kaj libertarianoj, kiuj veadas pri la totalismo estas papagoj kaj hipokrituloj. Estas pli da libereco en ia ajn diktaturo iomete malstaliniginta ol en ordinara usona laborloko. Vi trovas la saman specon de hierarkio kaj disciplino en fabriko aŭ oficejo ol en prizono aŭ monaĥejo. Fakte, kiel Foucault kaj aliuloj montris, la prizonoj kaj la fabrikoj aperis samtempe kaj ties kreintoj zorge kaj reciproke interpruntis siajn

kontrolmetodojn.

Laboristo estas partatempa sklavo. La mastro decidas kiam estas alvenenda, elirenda kaj kion fari tiutempe. Li diras al vi kiom da laboro estas farenda kaj kiom rapide. Li rajtas pluigi tiun kontrolon ĝis ekstremaj humiligoj, reglamentante laŭvole la vestaĵojn, kiujn vi surmetos, kaj kiom ofte vi povos iri al la necesejo. Escepte de iomete da okazoj, li povas forĵeti vin iale ajn ... aŭ neniale. Li spionigas vin de voktistoj aŭ de fidenuncistoj, li plenigas dosieron pri ĉiu dunginto. Rebatu nomiĝas “neobeemo” ekzakte kiel se laboristo estus knabaĉo kaj tio ne nur povas vin maldungi sed ankaŭ vin senigi pri senlaboreca monsubteno. Ne aprobante ambaŭ okazojn, oni devas noti ke la infanoj, ĉu en familio ĉu en lernejo, ricevas ekzakte la saman traktadon, pravigitan tiuokaze per ilia senmatureco. Kion ĝi signifas pri iliaj gepatroj kaj instruistoj ambaŭ laborantaj?

La humiliga sistemo de superregado, kion mi ĵus priskribis, reglamentas la duonon de la vekhoroj de multe da virinoj kaj de la ampleksa plimulto da viroj dum la plej granda parto de ties vivoj. Iele, nomi nian sistemon demokratio, kapitalismo aŭ, eĉ pli bone, industrialismo, ne estas tro erara sed ĝiaj pli realaj nomoj estas fabrikfascismo kaj ofica oligarkio. Kiu ajn asertas ke tiuj homoj estas “liberaj” mensogas aŭ estas stulta.

Vi estas tion, kion vi faras. Se vi faras tedan, stultan, unutonan laboron estas ŝancoj por ke vi

fariĝu tedulo, stultulo aŭ unutonulo. La laboro estas bonega klarigo de la insida kreteniĝo ĉirkaŭanta nin, multe pli ol tiel stultigaj mekanismoj kiel televidado kaj edukado. La homoj, kiuj estas enregimentitaj sian tutan vivon, kaptitaj el sia lernejo por la laboro kaj neglektitaj de sia familio ekde sia vartejo dum la infanaĝo ĝis la ekstremo de sia vivo, estas kutimigitaj al la hierarkio kaj mense slavigitaj. Ilia kapableco al aŭtonomio estas tiom kripligita ke ilia timo pri libereco estas la plej logika el multaj aliaj fobioj. Ilia obeemo trejnita en la laboro transiras ĝis la familioj, kiujn ili fondas, tiel reproduktante ĉiamaniere la sistemon en politiko, kulturo kaj en ĉiu alia afero. Ekde kiam vi sufokis la vivpovon de la homoj laboreje, ili bonvole submetiĝos al la decidoj de la hierarkio kaj al fakistoj en ĉiuj kampoj. Ili estas kondiĉitaj por tio.

Ni estas tiom ligitaj al la labora mondo, ke ni ne povas vidi kion ĝi okazigas al ni. Ni devas referenci al eksteraj observantoj de aliaj periodoj aŭ aliaj kulturoj por taksii la ekstremacon kaj patologiecon de nia nuna situacio. Estis periodo en nia propra pasinteco, kiam la nuna "laboretiko" estus nekomprenebla kaj eble Weber iel pravis kiam ĝian aperon li ligis kun la kalvinismo⁹. Tiu religio estus probable taksita kiel sekto se ĝi aperus hodiaŭ anstataŭ ol kvar jarcentoj antaŭe. Iel ajn, ni nur devas ĉerpi en la antikva saĝeco por rigardi la laboron en perspektivo. Niaj antaŭuloj ne eraris rilate la laboron, kaj iliaj konceptoj daŭre superis, ĝis la industrialismo kiu triumfis kun la beno de la

kalvinismaj profetoj.

Ni imagu, momenteton, ke la laboro ne igas la homojn stultaj submetituloj. Ni imagu, male al iu ajn kredinda psikologio eĉ al la ideologio de ĝiaj subtenantoj, ke la laboro ne efikas sur la formiĝon de l'karaktero. Kaj ni imagu ke la laboro ne estas teda, laciga kaj humiliga, tiel ke ni ĉiuj scias ke ĝi estas reale. Eĉ tiel, la laboro estus ankoraŭ primoko al ĉia humanisma kaj demokrata aspiro, nur ĉar ĝi sinproprigas tiom de nia tempo. Sokrato asertis ke la manlaboristoj fariĝas malbonaj amikoj kaj civitanoj ĉar ili ne havas tempon por plenumi la devojn de amikeco kaj civitaneco. Li pravis. Pro la laboro, ni konstante rigardas niajn horloĝojn, kion ajn ni faras. La ununura afero "libera" en la tiel nomata *libertempo* estas ke ĝi nenion kostas al la mastroj. La libertempo estas plejparte dediĉita al la pretigado por la laboro, la irado al la laboro, la reirado de la laboro kaj la ripozo pro la laboro. La libertempo estas eŭfemismo por la aparta esenco laŭ kiu la laboro kiel produktfaktoro ne nur transportas sin mem proprakoste ĝis kaj reire de la laborloko sed ankaŭ prizorgas ĉefan respondecon por sia propra bontenado kaj rekreado. Tion ne faras la karbono kaj la ŝtalo, nek la uzinmaŝinoj kaj la skribaparatoj¹⁰. Sed la laboristoj tion faras. Edward G. Robinson en unu el siaj gangsterfilmoj ekkrias: "laboro estas por la stultuloj".

Platono kaj Ksenofono atribuas al Sokrato (kaj evidente samopinias), konscion pri la nocaj efikoj de

la laboro sur la laboriston kiel civitanon kaj homan estulon. Herodoto identigis la malestimon al la laboro kiel atributon de la klasikaj grekoj dum la zenito de ties kulturo. Se paroli pri nura romia ekzemplo, Cicerono diris ke “kiu ajn donas sian laboron kontraŭ mono, tiu vendas sin mem kaj enviciĝas ĉe la sklavoj”. Tia sincereco estas rara nuntempe, sed nuntempaj primitivaj socioj, kiujn ni kutime malestimas, donis ekzemplojn, kiuj instruis la okcidentajn antropologojn. La kapaŭku de okcidenta Iriano, laŭ Posposil, havas koncepton de ekvilibro en la vivo kaj tiurilate laboras nur unu el du tagoj; la ripoztago nomiĝas “la reakirado perditan forton kaj sanon”. Eĉ tiel freŝdate kiel en la 18a jarcento, kiam ili estis de longe enkondukitaj en la vojon de nia nuntempa aĉejo, niaj prauloj estis almenaŭ konsciaj pri tio, kion ni forgesis: la kaŝitan flankon de la industriiĝo. Ilia religiema devoteco al “Sankta Lundo” – tiel stariganta la kvintagan semajnon 150 aŭ 200 jarojn antaŭ ĝia leĝa sankcio, estigis la senesperon de unuaj fabrikposedantoj. Longa tempo necesis antaŭ kiam ili submetiĝis al sonorilo, antaŭanto de horloĝo. Fakte dum unu aŭ du generacioj necesis anstataŭigi adoltajn virojn per virinoj kutimigitaj al obeemo, kaj geinfanoj, kiuj povis esti modeligitaj por konveni al la industria bezonoj. Eĉ la ekspluatataj kamparanoj de la *ancien régime* (franca antaŭrevolucia kaj antaŭkapitalisma epoko) rekaptis de siaj senjoroj gravan tempon de sia servuto. Laŭ Lafargue, unu kvarono de la kampara kalendaro estis dediĉita al la dimanĉoj kaj

feriaj tago. Ĉajanov¹¹, kiu studas la vilaĝojn en cara Rusio (verdire socio ne multe progresema), montras ke l'kamparanoj dediĉitas unu duonon aŭ kvinonon de sia tempo al la ripozo. Obseditaj de produktiveco, ni videble estas ege malantaŭe de tiuj arkaikaj socioj. La ekspluatataj muĵikoj sin demandus kial ni ĉiuj tiom laboras. Ankaŭ ni devus demandi tion al ni.

Por bone kompreni la amplekson de nia difektiĝo, tamen, ni observu la fruan kondiĉon de l'homaro, sen regado de l'privata proprieto, kiam ni vagadis kiel ĉas-plukistoj. Hobbes supozis ke l'vivo, tiam, estas danĝera, brutala kaj mallonga¹². Aliaj konjektis ke l'vivo estas batalo, malespera kaj senĉesa, por la vivtenado, milito daŭrigita kontraŭ kruela naturo kun ruiniĝo kaj morto atendanta la maŝanculon aŭ iun ajn, kiu ne estus sufiĉe armita por la defio de l'porviva batalo. Envere, tio estis nur la refleko de timo pri eventuala displitiĝo de l'registara decidpovo fare de komunumoj ne kutimigitaj agadi sen ĝi, kiel en la Hobbesa Anglio dum la enlanda milito. Tamen, la samlandanoj de Hobbes jam renkontis alternativajn formojn de socio kiuj montris aliajn vivmanierojn –aparte en Nordameriko– sed tiuj ĉi estis jam tro malproksimaj al iliaj propraj spertoj por esti kompreneblaj (la subaj klasoj, pli proksimaj al la indianaj kondiĉoj, tion komprenis pli bone kaj ofte ĝin trovis alloga; dum la 17a jarcento, anglaj koloniantoj transpasintaj al indianaj triboj aŭ kaptitaj dum milito rifuzis la reiron. Sed la indianoj ne tiel transpasis al blankulaj kolonioj samkiel okcidentgermanoj tranpasus la berlinan muron al la

orienta parto). La “pluvivo de la plej adaptita”, la versio laŭ Thomas Huxley¹³ de la darvinismo, estis pli bona atesto pri la Viktorina Anglio ol pri la natura selektado, kiel elmontris la anarkiisto Kropotkin en sia libro *Interhelpo, kiel faktoro de l'evoluo*¹⁴. (Kropotkin estis scienculo, geografo, kiu havis senvolan konvenon por studi sur eksperimenta tereno dum sia deportado en Siberio; li sciis pri kio li parolis). Kiel multaj sociaj kaj politikaj teorioj, la historio, kion pritraktas Hobbes kaj siaj sekvantoj estis envere nevola aŭtobiografio.

La antropologo Marshall Sahlins eksplodigis la Hobbesan miton en artikolo titolita “la origina abundeca socio”¹⁵, studante la karakterizaĵojn de nuntempaj ĉas-plukistoj. Iliaj laboroj daŭras notinde malpli ol niaj kaj estas malfacile distingeblaj de tio, kion ni konsideras ludo. Sahlins konkludis, ke “ĉas-plukistoj laboras malpli ol ni kaj, prefere ol laciga tasko, intermitas la priserĉado nutraĵon, abundas la libertempo kaj estas pli granda kvanto da dormado, tage kaj persone, ol en ĉiu ajn alia socio”. Ili laboras averaĝe kvar horojn tage, se oni supozas ke tio estas “laboro”. Ilia “laboro”, kiel ĝi aspektas al ni, estas *altkvalita* laboro, kiu trejnas ilian fizikan kaj intelektan kapablon; nesperta laboro, kiel diras Sahlins, ne eblas krom dum industrialismo. Tiel ĝi taŭgas al la difino de ludo far Friedrich Schiller: la nura okazo kiam la homo realigas sian tutan homecon lasante plenan “ludon” (liberecon) al ambaŭ flankoj de sia duobla naturo, la penso kaj la sento. Kiel li asertas “la animalo laboras kiam la

manko estas la ĉefa fonto de ĝia agado, kaj ludas kiam la pleneco de ĝiaj fortoj estas la ĉefa fonto, kiam la superabunda vivo estas ĝia propra stimulantanto al aktiveco”.

Ludo kaj libereco havas, rilate produktadon, la saman signifon. Eĉ Marx, kiu apartenas al la produktivisma panteono (malgraŭ siaj bonaj intencoj), notis ke “la reĝlando de la libereco komencas nur kiam estas transpasita la punkto antaŭ kiu la laboro estas devigata far la neceseco kaj la ekstera utileco”. Li neniam povis sufiĉe identigi tiun punkton, feliĉan okazaĵon, kiel ĝi estas: la abolo de la laboro. Povis aspekti iom paradoksa, dum la 19a jarcento, plenumi porlaboristajn kaj kontraŭlaborajn batalojn. Nun tio eblas.

La aspiro retroiri, aŭ transiri, al vivo sen laboro evidentiĝas en ĉiuj seriozaj sociaj aŭ kulturaj historioj de la preindustria Eŭropo, i.a. “Anglio en transiĝo” (*England in transition*) de Dorothy George kaj “Popola kulturo en frua moderna Eŭropo” (*Popular Culture in Early Modern Europe*) de Peter Burke. Ankaŭ trafa estas la eseo de Daniel Bell, “La laboro kaj ties plendoj” (*Work and his discontents*), la unua teksto, mi kredas, kiu tiom amplekse referencas al “ribelo kontraŭ la laboro”, kaj klariĝas kiel grava korekto al la memkontentiĝa normale asociita verko kun kiu ĝi estas arigita, *La fino de la ideologio* (*The End of Ideology*)¹⁶. Nek la kritikantoj nek la laŭdantoj notis ke la tezo de l’fino de la ideologio de Bell signis ne la finon de la socia

tumulto sed la komencon de nova nekonata periodo ne trudita nek alarmita de ideologio. Estis Seymour Lipset (en “Politika Homo”), ne Bell, kiu anoncis en la sama momento ke *la fundamenta problemo de la industria revolucio estas solvita*, nur kelkajn jarojn antaŭ kiam la post- aŭ meta-industriaj plendoj de studentoj kondukis Lipset-on de Berkeley Universitato ĝis la relativa (kaj portempa) trankvileco de Harvard.

Kiel Bell rimarkas, Adam Smith en *La riĉeco de l'nacioj*, malgraŭ sia entuziasmo por la merkato kal la divido de la laboro, estis pli konscia (kaj pli honesta) pri la aĉa flanko de la laboro ol iu ajn el siaj modernaj epigonoj aŭ iu ajn ano de la ekonomika skolo de Chicago¹⁷. Kiel Smith observis: “La inteligenteco de la plimulto da homoj estas necese kondiĉita de ties ordinara funkcio. La homo kiu pasas sian vivon farante iom simplajn operaciojn ne havas okazojn por ekzerci sian inteligentecon... Ĝenerale li iĝas tiel stulto kaj nescianto, kiel tio eblas por homa estulo”. Jen, per kelkaj krudaj vortoj, mia kritiko de la laboro. Bell, skribanta en 1956, la ora tempaĝo de la Eisenhowera stulteco kaj usona memkontenteco, identigis la neorganizitan kaj neorganizeblan konfuzon ekde la 1970aj jaroj kiel tiun, kiun neniu politika tendenco povas kontroli, kiu ne povas esti ekspluatita kaj sekve estas ignorita. Tiu problemo estas la ribelo kontraŭ la laboro. Ĝi ne figuras en iu ajn teksto de iu ajn ekonomikisto de “*laissez-faire*” (liberala) – Milton Friedman, Murray Rothbard, Richard Posner – ĉar laŭ iliaj vortoj, kiel

oni diras en la TV felietono *Star Trek*, “tion oni ne kalkulas” (*it does not compute*).

⁹ Max Weber (1864-1920) germana filozofo kiu notinde verkis “la protestanta etiko kaj la spirito de l’kapitalismo” (*Die protestantische Ethik und der Geist des Kapitalismus*, 1904-1905) en kiu li provis ligi la aperon de l’kapitalismo kun tiu de l’protestantismo.

¹⁰ La laboro estas tiu aparta varo, kiu produktas varojn. Vidu « La produktado de varoj per varoj » (*Production of Commodities by Means of Commodities*, Cambridge University Press, 1960), verko publikigita en 1960 de la italo Piero Sraffa, disĉiplo de Keynes kaj amiko de Gramsci.

¹¹ Ĉajanov (1888-1937) estis rusa ekonomikisto, proksima al popolistoj, kiu ege interesiĝis pri la rusaj kamparaj komunumoj (vd. *Chayanov, peasants, and economic anthropology*, eldonita de E. Paul Durrenberger, Academic Press, New York, 1984).

¹² Thomas HOBBS (1588-1679), angla filozofo kiu notinde publikigis la *Leviatano*-n (1651), verko en kiu li provas elmontri ke, en la origino de l’homaro regnis la milito de ĉiuj kontraŭ ĉiuj (*bellum omnium contra omnes*). Tiam, por eviti sian malaperon, la homoj decidis krei la ŝtaton al kiu li mendis krei la leĝon. Laŭ Hobbes la homo estas nature malbona. Poste Rousseau, notinde, kontraŭos tiun logikon.

¹³ Thomas Huxley (1825-1895) estis disĉiplo de Darwin.

¹⁴ Kropotkin, *Interhelpo kiel faktoro de l’evoluo*, SAT k. Impeto, 1995 (originala versio: P.A. Kropotkin, *Mutual Aid A Factor of Evolution*, Heineman, London 1902).

¹⁵ Vidu Marshall Sahlins, *Stone age economics*, Aldine-Atherton, Chicago, 1972, verko en kiu la esploroj de tiu antropologo estas disvolviĝintaj.

¹⁶ Daniel Bell, *The end of Ideologie. On the exhaustion of political ideas in the fifties*, 1960. Daniel Bell komencas la

tekston, kiun elvokas Bob Black, citante tiun aserton de Montaigne: “Ili iras al la laboro sen la plej eta ĝojo, tien ili iras, kiel oni diras, nur sur unu gluteo” kaj asertante ke tio estas fenomeno fatala de la industria socio. En la fino de tiu teksto, Bell Skribas: “La laboro, diras Freud, estas la esenca rimedo por ligi la individuon kun la realeco. Kio okazos, cetere, kiam ne nur la laboristo sed la laboro mem estos anstataŭitaj per maŝinoj?”.

¹⁷ Gviditaj de Milton Friedman, la ekonomikistoj de la skolo de Chicago (kontraŭstarantoj de tiu de Cambridge antaŭe gvidita de Keynes) estas la teoriistoj de la nov-liberala fluo, kiu, ekde la mezo de la 1970aj jaroj, impetis trans la tuta tero.

LA GENOCIDA LABORO

Se tiu aro da argumentoj, instruita per la amo al la libereco, fiaskas persvadi la utilismajn aŭ paternalismajn humanistojn, estas aliaj, kiujn ili ne povas ignori. La laboro nocas vian sanon¹⁸. Fakte, la laboro estas *amasmurdo* aŭ *genocido*. Rekte aŭ ne, la laboro mortigos pli ol ĉiujn homojn, kiuj legas tiun libron. Inter 14.000 kaj 25.000 laboristoj estas jare mortigitaj en laboro en Usono. Pli ol du milionoj estas kripligitaj. 20 aŭ 25 milionoj estas vunditaj. Kaj tiuj ciferoj estas bazitaj sur ege konservativa konsidero pri tio, kio estas labordamaĝo. Sekve ili ne nombras la ĉiujaran duonmilionon da kazoj da profesiaj malsanoj¹⁹.

Mi rigardis medicinan libron pri profesiaj malsanoj, kiu entenas 1.200 paĝojn. Eĉ tio apenaŭ skrapas la supraĵon. La disponeblaj statistikoj nombras la evidentajn kazojn, kiel tiujn 100.000 ministrojn, kiuj havas silicozon, el kiuj 4.000 mortas ĉiujare, kvoto da akcidentoj ja pli alta ol tiu de aidoso, ekzemple, kiu kaptas tiom da atento de la amaskomunikiloj. Tio spegulas la implicitan supozon laŭ kiu aidoso trafas perversulojn kiuj povus kontroli siajn agadojn dum karbonminado estas sanktega nekontestebla aktiveco. La statistikoj ne montras tiujn dekojn da milionoj da homoj, kies

vivdaŭro estas kurtigita de la laboro – kio ankaŭ signifas tamen homicidojn. Vidu la kuracistojn, kiuj konsentas labori ĝis sia morto en la kvindekaj jaroj. Vidu ĉiujn aliajn labormaniulojn (*workaholics*).

Eĉ se vi ne estas mortigita aŭ kripligita laborante reale, tio povus ja okazi al vi kiam vi iras al la laboro, reiras de la laboro, serĉas laboron, aŭ kiam vi provas forgesi la laboron (ekz. aŭte). La granda plimulto da viktimoj de la aŭtomobilo estas ĉu plenumantaj unu el tiuj aktivecoj devigitaj de la laboro, ĉu la suferintoj de tiuj ĉi. Al tiu kreskinta kadavrkonto estas aldoninda la viktimoj de la industria poluado kaj la emoj instigitaj de la laboro al alkoholismo kaj drogkonsumo. Ambaŭ kancerroj kaj kormalsanoj estas modernaj patologioj normale estigitaj, rekte aŭ ne, de la laboro.

Sekve, la laboro institucas la homicidon kiel vivmanieron. La homoj pensas ke la kamboĝanoj estis frenezaj ĉar ili sin amasbuĉis, sed ĉu ni iel diferenciĝas? La Pol-Pota reĝimo almenaŭ havis esperon, kvankam malklaran, pri egaleca socio. Ni multmaniere mortigas homojn cele al vendi hamburgerojn (*Big Macs*) kaj Cadillacs al la postvivantoj. Niaj kvardek aŭ kvindek miloj da mortintoj jare pro veturilakcidentoj estas viktimoj, ne martiroj. Ili mortis por nenio – aŭ prefere ili mortis por la laboro. Nu la laboro tute ne penindas la morton.

Malbona novaĵo por la reformistoj: iu ajn provo de reguliga flikado nenion valoras en tiu mort-aŭ-

viv-kunteksto. La federa administracio por sekureco kaj sano (usone: OSHA) estis kreita por kontroli la koran parton de l'problemo, la sekurecon en la laborloko. Eĉ antaŭ kiam Reagan kaj la supera kortumo paralizis ĝin, OSHA estis farso. Laŭ la origina kaj malavara (ordinaraj) normoj de la Carter-a periodo, iu laborloko riskis sperti lotecan inspekton de OSHA ĉiun 46an jaron.

La ŝtata kontrolo de la ekonomio ne estas solvo. La laboro, se tio eblas, estas multe pli danĝera en ŝtatsocialismaj landoj. Miloj da rusaj laboristoj estis mortigitaj aŭ vunditaj konstruante la moskvan metron. Historio eĥoas sovetajn nuklearajn katastrofojn kiuj similigas Three Mile Island akcidenton²⁰ al kampada ekzerco por elementa lernejo. Aliflanke, la senregulado nuntempe laŭmoda ne alportos solvon kaj probable pligravigos tiun problemon. Laŭ sanitara kaj sekureca vidpunkto, inter aliaj, la laboro spertis siajn plej nigrajn tagojn kiam la ekonomio estis la plej proksima al *laissez-faire* (liberalismo).

Historiistoj kiel Eugene Genovese konvinkige asertis ke la salajrataj laboristoj en nordamerikaj ŝtatoj kaj en Eŭropo spertis pli aĉan situacion ol la sklavoj de l'sudaj plantejoj²¹; la apologiistoj de la antaŭmilita sklaveco tion gurdis. Neniu rearanĝo de la rilatoj inter burokratoj kaj privataj entreprenistoj ŝajnas havigi ioman diferencon laŭ produkta vidpunkto. Serioza apliko de la normoj, eĉ malprecizaj, de OSHA, eventuale paralizus la

ekonomion. Tion ŝatas la juraplikantoj, tiel ili neniel ajn provas rigori kontraŭ la plimulto da deliktuloj.

¹⁸ En la angla teksto la aŭtoro skribas “La laboro nocas vian sanon, laŭ pruntepreno al titolo de libro”. Mi ne scias pri kiu libro temas. Fakte, tie oni pensas al tio, kio estas skribita sur la cigaredpaketoj en kelkaj landoj: kiel la tabako, la laboro nocas la sanon.

¹⁹ Tio estas skribita en 1985. Pli freŝdataj statistikoj instruas al ni, ke ĉiujare kaj tutmonde okazas **du milionoj da prolaboraj mortintoj** (ĉu pro laborakcidentoj ĉu sekve de profesiaj malsanoj) de kiuj 15% okazas en la industriaj landoj. Tiu nombro konsiderinde kreskis ĉar, en 1990 estis “nur” 1,2 milionoj da prolaboraj mortintoj (intervjuo de Jukka Takala, reprezentanto de la Internacia Buroo de la Laboro en Genevo far la franca ĵurnalo *Libération*, la 31an de majo 2002).

²⁰ La nukleara akcidento en nukleara deponejo de Kiŝtim, en 1957, estigis pluraj centojn da mortintoj. Sovetunio kaŝis tion dum pli ol tridek jaroj. Oni ankaŭ devas mencii Ĉernobilon. Kompare kun tio, la akcidento en la nuklera centralo de Three Mile Island, la 28an de marto 1979.

²¹ Eugene Genovese, *From rebellion to revolution: Afro-American slave revolts in the making of the modern world*, Baton Rouge: Louisiana State University Press, 1979.

KIEL EKSTERMI LA LABORON

Kion mi diris, tio ne devus esti kontestita. Multaj laboristoj estas ŝtopnutritaj per laboro. Laborloke, estas altaj kaj kreskantaj kvotoj da malĉeestismo, laborŝanĝado (*turn over*), ŝtelado, sabotado, sovaĝaj strikoj kaj ĝenerale de pigrado. Tiel, estas eble iu movado al konsciiĝo kaj ne nur viscera reĵeto de la laboro. Sed ĝisnune la supera sento, universala inter la mastroj, ties asistantoj kaj ankaŭ dissemitaj inter la laboristoj mem, estas la neceseco kaj la fataleco de la laboro.

Mi disopinias. Nun eblas aboli la laboron kaj ĝin anstataŭigi, laŭmezure kiel ĝi havas utilajn celojn, per nova speco de multaj liberaj aktivecoj. Aboli la laboron necesas trafi la problemon laŭ du direktoj, kvante kaj kvalite. Unuflanke, kvante, ni devas detrui amase el la laborkvanto nune plenumita. Nuntempe multaj laboroj estas, plej bone, senutilaj kaj ni simple devus seniĝi el ili. Aliflanke - kaj mi pensas ke tio estas la nodo de la afero kaj la nova revolucia deirpunkto - ni devas preni la utilan laboron, kiu restas, kaj ĝin transformi en agrablan diversecon de ludoj kaj artoj, kvazaŭ hobiaj ne distingeblaj de la aliaj plaĉaj ŝatokupoj, krom ke, finfine, ili havigas

utilajn produktojn. Certe, tio ne devus igi ilian plenumon malpli alloga. Poste, la artefaritaj bariloj de la potenco kaj de l'proprieto povus disfali. La kreado povus fariĝi amuzo. Kaj ni povus ĉesi timi de ĉiu aliulo.

Mi ne sugestas ke la plimulto da laboro, tiamaniere povus esti rehonorigita. Sed la plimulto da laboro ne indas esti savita. Nur eta, etiĝanta frakcio da laboro servas por iu utila celo sendepende de la defendo kaj reproduktado de la laborsistemo kaj ties politikaj kaj leĝaj pluiĝoj. Antaŭ 20 jaroj Paul kaj Percival Goodman taksis ke nur 5% da laboro tiam plenumita povus kontentigi niajn elementajn bezonojn por nutrado, vestado kaj ŝirmado²² - probable tiu cifero, se ĝi estas ekzakta, estas nun pli eta. Ilia takso estis nur instruema supozo sed la ĉefa punkto estas sufiĉe klara: rekte aŭ ne, multaj laboroj servas la sterilajn aktivecojn de la komerco aŭ de l'socia kontrolo. Senprokraste, ni povas liberigi dekojn da milionoj da reprezentistoj, soldatoj, estroj, policistoj, monŝanĝistoj, pastroj, bankistoj, juristoj, instruistoj, bienuloj, sekurgardistoj, reklamistoj kaj ĉiu persono, kiu laboras por ili. Tie estas efekto de neĝbulo ĉar, je ĉiu momento kiam vi sendugas iun grandan estron, vi ankaŭ liberigas ties servistojn kaj subulojn. Sekve, la ekonomio dissplitiĝas.

Kvardek elcenton da laborforto konsistigas blankkolumaj laboristoj; la plimulto da ili havas la plej tedajn kaj stultajn taskojn neniam ajn imagitajn. Kompletaj industrioj, asekureco, banko kaj

domnegoco, ekzemple, konsistas el nenio krom senutila paper-brakmiksado. Tio ne estas hazardo, ke la terciara sektoro de la servoj kreskas dum la sekundara stagnas kaj la primara, tiu de la agrikulturo, preskaŭ malaperas. Tial ke la laboro estas sennecesa krom por tiuj kies potenco estas tiel plifortigita, la laboristoj translokiĝas de relative utila aktiveco ĝis sennutila aktiveco cele al certigi la publikan ordon. Io ajn estas pli bona ol nenio. Jen kial vi ne povas rehejmiĝi nur ĉar vi finus vian laboron. Ili volas vian tempon, sufiĉe por ke vi apartenu al ili, eĉ se ili ne havas uzadon por la plejparton da tiu ĉi. Alimaniere kial la averaĝa laborsemajno ne malkreskis je pli ol kelkaj minutoj dum la lastaj kvindek jaroj?

Poste ni povas perhake distranĉi en la produktado mem. Ne plu da milita produktado, nutraĉo, senodorilo por ina higieno kaj ĉefe, sendire, ne plu da aŭtoindustrio. Okaze, unu "Ford T" aŭ "Stanley Steamer" estus akceptebla sed la aŭto-erotikismo de kiu dependas tiel fekejoj kiel Detroit kaj Los Angeles estas ekster demando. Jam, eĉ ne provante, ni virtuale solvis la energikrizon, la mediokrizon kaj tielajn laŭdire ne solveblajn sociproblemojn.

Finfine, ni devas malaperigi la notinde plej gravan okupadon, la unuan laŭ la plej ampleksaj horaroj, malaltaj pagoj kaj tedaj taskoj. Mi parolas pri domlaboro kaj infanbredado plenumita de dommastrinoj. Abolante salajratan laboron kaj realigante la plenan senlaborecon, ni subfosas la

seksan labordividon. La nuklea familio, kiel ni ĝin konas, estas neevitebla adaptaĵo de la labordivido trudita far la salajrata laboro. Vole nevole, kiel la aferoj fariĝis de unu aŭ du jarcentoj, tio estas ekonomie racia ke la viro alportas hejme nutraĵon, ke la virino laboras de matene ĝis nokte por havigi al li rifuĝejon en senkora mondo, ke la infanoj estas kondukita al junularaj koncentrejoj nomitaj “skoloj”, origine por ilin malproksimigi el ties panjokruroj sed daŭre sub kontrolo, sed akcesore por ke ili enmensigu la kutimojn de obeeco kaj akurateco tiom necesaj al la laboristoj. Se vi volas liberigi vin el patriarkeco, liberigu vin el la ununuklea familio kies nepagita “nigra laboro”, kiel asertas Ivan Illich²³, ebligas la laborsistemon, kiu necesigas ĝin. Rekte ligita kun tiu “kontraŭnuklea” strategia estas la abolo de la infaneco kaj la fermo de la skoloj. Estas pli da plentempaj studentoj ol da plentempaj laboristoj en tiu lando. Ni bezonas infanojn kiel instruistojn ne kiel studentojn. Ili devas notinde kontribui al la luda revolucio ĉar il estas pli bonaj ludantoj ol la plenkreskuloj. Adoltoj kaj infanoj ne estas identaj sed ili fariĝos samvaloraj per sia interdependenco. Nur la ludo povas transsalti la generacian foson.

Mi eĉ ankoraŭ ne menciis la eblecon forigi la etan parton da restanta laboro per aŭtomacio kaj kibernetiko. Ĉiuj scienculoj, teknikistoj kaj inĝenieroj liberigitaj el la zorgoj de l’ milita esplorado kaj planigita kadukiĝo²⁴ devus pasigi agrablan tempon diskutante pri la rimedoj elimini lacon, tdon kaj danĝeron el aktivecoj kiel minado.

Sendube ili trovos aliajn projektojn por sin amuzi. Eble ili starigos integran tutteran amaskomunikilan sistemon²⁵ aŭ trovos spacokoloniojn. Eble. Mi mem ne estas fanatika por la teknikaj bagatelaĵoj. Mi ne ŝatus vivi en prembutona universo. Mi ne volas sklavajn robotojn, kiuj fabrikus ion ajn; mi volas fari miajn aferojn per mi mem. La teknologioj ŝparantaj laboron havu sian lokon, tion mi pensas, sed modestan lokon. La historiaj kaj prehistoriaj atestoj ne igas nin optimismaj. Dum la produktada teknologio transpasis de la ĉas-plukado ĝis la industrio tra la agrikulturo, la laborkvanto plialtiĝis tiam ke la lerteco kaj aŭtonomio malkreskis. La posta evoluo de la industrialismo emfazis tion, kion Harry Braverman nomis la *difektiĝo de la laboro*. Inteligentaj observantoj ĉiam konsciis pri tio. John Stuart Mill rimarkis ke ĉiuj laborŝparaj inventoj iame imagitaj neniam ŝparis momenteton da laboro. Karl Marx skribis ke “estus eble skribi historion de la inventoj faritaj de 1830 por la nura celo havigi armilojn al kapitalo kontraŭ la ribeloj de la laboroklaso”. La entuziasmaj teknoŝatantoj – Saint-Simon, Comte, Lenin, B.F Skinner – ĉiam estis senhontaj aŭtoritatistoj, nome teknokratoj. Pli ol skeptikaj ni devus esti pri la promesoj de la komputikaj mistikuloj. Ili laboras kiel hundoj; se oni lasas ilin agi, estas ŝancoj por ke ni havu la saman sorton. Sed ni iom aŭskultu ilin se ili havas iun ajn specialan kontribuon pli volonte subigitaj al homaj celoj ol la impeton de la altaj teknikoj.

²² Percival kaj Paul Goodman, *Communitas: means of livelihood and ways of life*, The University of Chicago Press, 1947.

²³ Ivan Illich (1926-2002), estinta pastro, verkis multajn librojn proksimaj al la alternativa movado, notinde “Energio kaj justeco” (*Énergie et équité*, Seuil, Paris, 1973) kaj “Edukado sen skolo” (*Education without schools*, Souvenir Press, London, 1973).

²⁴ La planigita kadukiĝo estas tiu sistemo ĝenerale uzata, per kiu la industriistoj limigas la vivdaŭro de siaj produktoj.

²⁵ Kiam Bob Black skribas tiujn linioj Interreto estas nur balbutanta.

²⁶ Harry Braverman, *Labor and monopoly capital; the degradation of work in the twentieth century*, artikolo aperinta en la usona revuo *Monthly Review* en 1975.

LUDA REVOLUCIO

La laboro iĝinta ludo, tion mi volas vidi.

Unua paŝo estas forbalai la nociojn “tasko” kaj “okupado”. Eĉ aktivecoj jam entenantaj iun ludan parton, ĝin perdas ĉar ili estas reduktitaj en taskojn, kiujn nur kelkaj homoj, escepte de ĉiuj aliaj, estas truditaj plenumi. Ĉu tio ne estas freneza, ke farmlaboristoj pene laboraĉas en kampoj dum iliaj klimatizitaj mastroj rehejmiĝas ĉiusemajnfine kaj golfludas en siaj ĝardenoj? Sub sistemo de ĉiama festo ni spertos la Ortempaĝon de la diletanteco, kiu hontigos la Renesancon. Ne plu estos taskoj, nur aferoj plenumindaj kaj personoj, kiuj plenumos ilin.

La sekreto igi laboron ludo, kiel Charles Fourier²⁷ elmontris, estas aranĝi utilajn aktivecojn por profiti de tio, kion diversaj homoj je diversaj momentoj ŝatus envere fari. Por ebligi al kelkaj plenumi la aferojn, kiujn ili povus ŝati, sufiĉos nur elradikigi la malraciecojn kaj distordojn, kiuj tristigas tiujn aktivecojn kiam ili estas reduktitaj en laboron. Ekzemple, mi ŝatus iom (sed ne tro) instrui, sed mi ne volas truditajn studentojn kaj mi primokas la botlekadon al malkapablaj pedantoj por havi postenon.

Due, estas kelkaj aferoj, kiujn homoj ŝatas fari

portempe, sed ne tro longe kaj certe ne plentempe. Vi povas ŝati vartadon dum kelkaj horoj por partopreni la kompanion de infanoj, sed ne tiom, kiom faras la gepatroj. Tiuj ĉi, dumtempe, ege ŝatas la tempon, kiun vi liberigas al ili, kvankam ili angorus tro longe disiĝi el sia naskitaro. Tiuj diferencoj inter individuoj estas tio, kio ebligas liberludan vivon. La sama principo aplikiĝas al multaj aktivkampoj, aparte la ĉefaj. Tiel multaj homoj ŝatas la artkuiradon kiam ili povas ĝin serioze praktiki dum la ludtempo sed ne kiam temas proviantaj homajn korpojn por ties laboro.

Trie, kelkaj aferoj estas malkontentigaj kiam ili estas faritaj de vi tutsule aŭ en malagrabla ĉirkaŭaĵo aŭ sub la ordono de iu estro, sed ŝatindaj, almenaŭ portempe, kiam tiuj cirkonstancoj estas ŝanĝitaj. Tio probable veras, iugrade, por ĉia laboro. Homoj disvolvas sian ampleksan inĝeniecon por, kiel eble plej bone, igi ludon la plej malloga taskaĉo. Aktivecoj, kiuj logas kelkajn homojn, ne ĉiam logas ĉiujn aliajn sed ĉiu el ni, almenaŭ potencie, havas diversecon da intereso kaj interesiĝas pri diverseco. “Ĉiu afero almenaŭ unu fojon”, kiel asertas la proverbo. Fourier estis la majstro, esplorante kiamaniere dislogikaj kaj perversaj emoj povus esti utiligitaj en la postciviliza socio, kiun li nomi Harmonio. Li pensis ke imperiestro Nerono fariĝintus virta se, kiam li estis infano, li povintus satigi sian guston por la sango laborante en buĉejo. Infanetoj, kiuj notinde ŝatas sterniĝi en la koto, povus esti organizataj en “etaj hordoj” por purigi la

necesejojn kaj malplenigi la rubujojn, kun medaloj premiantaj la elstarajn. Mi ne subtenas tiujn precizajn ekzemplojn de Fourier sed la entenatan principon, kiu, mi pensas, havigas perfektan sencon por ĝenerala revolucia transformado.

Ni ne forgesu ke ni ne devas preni la hodiaŭan laboron ekzakte kiel ni trovis ĝin kaj dispartigi ĝin al la taŭgaj personoj, inter kiuj kelkaj estus ja perversaj. Se la tekniko iel rolas en ĉio ĉi, tio estas malpli por eltiri laboron el la ĉiutaga vivo aŭtomatigante ĝin, ol malfermi novajn kampojn por la (re)kreado. Laŭ iu vidpunkto ni povus reiri al la manfarado, kiun William Morris konsideris probable kaj deziderinda rezulto de la komunisma revolucio²⁸. La arto devus esti forprenita el la manoj de la snoboj kaj kolektantoj, abolita kiel fako kontentiganta elitajn spektantaron, kaj ĝiaj kvalitoj de beleco kaj kreado redonita al la integra vivo de kiu ili estis ŝtelkaptitaj far la laboro. Estas pripensinde ke la grekaj vazoj, kiujn ni ekspozicias en muzeoj kaj pri kiuj ni verkas himnojn estis uzataj siatempe por stoki olivoleon. Mi dubas, ke niaj ĉiutagaj fabrikaĵoj tiom famos en la venonteco, se tiu lasta estos. La problemo estas ke nenia afero kiel la progreso eblas en la labormondo, tute male. Ni ne devus heziti pruntepreni de la pasinteco tion, kion ĝi povas oferi, la prauloj nenion perdas eĉ ni estas pli riĉaj.

La reinvento de la ĉiutaga vivo signifas preterpasi nian ordinaran senson. Estas envere pli da allogaj

konjektoj ol tio, kion suspektas multaj homoj. Flanke de Fourier kaj Morris – kaj eĉ de Marx, per aludo tie ĉi aŭ for - estas la skribaĵoj de Kropotkin, la sindikatistoj Pataud kaj Pouget²⁹, anarko-komunistoj malnovaj (Berkman)³⁰ aŭ novaj (Bookchin)³¹. La *Communitas* de la Goodman fratoj estas bona ekzemplo por illustri kiajn formojn naskiĝas el niaj projektoj. Estas io plukinda de la ofte nebulaj heroldoj de la alternativa-alpropriga-peranta-kunvivema teknologio, kiel Schumacher kaj ĉefe Illich, ekde kiam vi malŝaltis ilian nebulaparaton. La situaciistoj – kiel reprezentitaj en “Revolucio en la ĉiutaga vivo” kaj en “Internacia Situaciisma Antologio” de Vaneigem³² estas tiel klarvidaj kiel ekzaltaj, eĉ se ili neniam sufiĉe klarigis la kongruon de la reguloj de la laborkonsilantaroj kun la abolo de la laboro. Iliaj malĝustecoj tamen pli valoras ol iu ajn nuntempa versio de la maldekstrismo, kies aktivantoj ŝajnas esti la lastaj ĉampionoj de la laboro, tial ke se ne plu estos laboro, ne plu estos laboristoj kaj sen laboristaro, pri kio la maldekstrularo devus zorgi?

Tiel la abolistoj povos fidi nur sin mem. Neniu povas diri tion, kio okazus per la senkatenado de la kreiva potenco sufokita far la laboro. Ĉio povas okazi. La enuiga debato “libereco kontraŭ neceseco”, kun ĝiaj teologiaj parfumoj, solviĝas per si mem praktike ekde kiam la produktado de utilaj riĉecoj kongruas kun plaĉaj ludaj agadoj.

La vivo fariĝos ludo, aŭ prefere ludaro, sed ne –

kiel nuntempe – ludo kun nula sumo. Optimuma seksa interŝanĝo estas la paradigmo (centra modelo) de la produktiva ludo. Ĉiu partoprenanto maksimumigas alies plezuron, neniu kontrolas la poentaron kaj ambaŭ gajnas. Ju pli vi donas, des pli vi havas. En la luda vivo, la plej bona el la seksaj aferoj disvastiĝos en la plej bonaj momentoj de la ĉiutaga vivo. Ĝeneraliĝinta ludo enkondukos al la libidinado de l'vivo. Reciproke, seksumado povas fariĝi malpli urĝa kaj malespera, pli riĉiga. Se ni bone ludas niajn kartetojn, ni ĉiuj kapablas ricevi pli el la vivo ol tio, kion ni alportis, sed nur se ni *reale* ludas.

Neniam iu ajn devus labori. Laboristoj el ĉiuj landoj... *rilaksiĝu!*

²⁷ Charles Fourier (1772-1837) estas franca prasocialisto aprobanto de la komunejoj. Li estas la granda antaŭlo de la laborludo kaj de la festeca socio, do la majstro de black.

²⁸ William Morris (1834-1896) estis pentristo kiu vivis en Anglio dum ĝi estis la manlaborejo de l'mondo (viktorina erao), periodo, kiun li hatis. Li celis renovigi la prametiistan produktadon. La interparoloj, kiun li havis kun kelkaj laboristoj, kiuj ĉeestis ties prelegoj pri arto kondukis lin al socialismo.

²⁹ Emile Pataud kaj Emile Pouget estas francaj anarki-sindikatoj kiuj verkis kune “Kiel ni plenumis la revolucion”. En tiu libro ili rakontas ke, post tiu revolucio, la sindikatoj kaj laborborsoj ĉesas estis luktiloj por fariĝi produktiloj mastrumitaj de la laboristoj, la “koro” kaj la “animo” de la movado por la konstruado de la nova socio. La libro estis freŝdate reeldonita en Francio (Syllepse, Paris, 1995).

³⁰ Aleksandro Berkman (1870-1936) estis en Usono la

kunulo de Emma Goldman. Li notinde verkis “Kio estas anarko-komunismo” (*What is communist anarchism?* The Vanguard press, New York, 1929).

³¹ Murray Bookchin (naskiĝinta en 1921) estas la iniciatoro de la freŝdata skolo de la libereca municipismo. Notinde verkis “Direkte al ekologia socio” (*Toward an ecological society*, Black Rose Books, 1980).

³² Raoul Vaneigem, *The revolution of everyday life*, Rising Free Collective, London, 1979. Vidu ankaŭ *Traité de savoir-vivre à l’usage des jeunes générations*. [Paris] Gallimard, 1967.

La **eldona fako kooperativa** estis kreita komence de 2007, post referendumo sekve al propono en la beograda SAT-kongreso de 2006. Ĝi celas faciligi la plenumon de la statutaj taskoj de SAT per eldono de kleriga materialo, pretigita kadre de kolektiva laboro kaj kun laŭeble kohera eldonpolitiko, ankaŭ kolektive difnita.

La eldona fako estas kooperativa. Tio signifas ke ĝi fincas siajn eldonojn per la profito akirita dum la vendo de antaŭaj eldonoj. Tiu sistemo ebligas ankaŭ eldonon de valoraj libroj, kies vendebleco estas limigita.

Kvankam la eldonprezoj por la paperaj eldonaĵoj de la kooperativo estas kiel eble plej malaltaj, ili tamen certe restos tro altaj por kelkaj kamaradoj. Tial estas antaŭvidite senpage havigi 10 procentojn el ĉiuj eldonitaj libroj al nepagipovaj kamaradoj. La eldona fako celas zorgi ankaŭ pri elektronikaj eldonoj, por faciligi la diskonigon de dokumentoj ne adaptitaj al la papera formato, kaj plu plialtigi la kvaliton de la SAT-kultura retejo.

www.satesperanto.org/eldonkooperativo/

eldona fako kooperativa de SAT